

La prepozicio PO

Claude Gacond, 415-a radioprelego, 1971.09.22 & 25

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiam ni partoprenas esperanto-manifestaciojn, ni rimarkas klasikajn gramatikajn erarojn. Tiuj eraroj fontas el lernolibraj mankoj. Dum tiu ĉi aŭtuno ni provos de tempo al tempo atentigi niajn geaŭdantojn pri unu el tiuj klasikaj eraroj, en la espero faciligi al ĉiu pli precizan uzon de nia lingvo internacia.

A.- Tre malofte la prepozicio **po** estas bone uzata. Oni povas eĉ diri, ke la falsa uzo de tiu prepozicio tiom disvastiĝas, ke estas maloftaĵo aŭdi frazon, en kiu ĝi estas bone uzata. Tio reprezentas iun danĝeron por la estonteco mem de esperanto.

Cl.- Jen kion Henri Vatré skribis en la revuo *Svisa Espero* de januaro 1971 koncerne al tiu prepozicio **po** :

A.- « Niaj verkistoj malmulte uzas la prepozicion **po**. Tamen la *Plena Vortaro de Esperanto* kaj la *Plena Gramatiko de Esperanto* traktas ĝin amplekse per abundaj klarigoj kaj ekzemploj, ĉar ĝia uzo iom embarasas plurajn eĉ bonajn esperantistojn.

Cl.- Se **po** vin perpleksigas, konsultu esperanto-nacilingvan vortaron por kontroli la veran signifon de tiu vorto. **Po** ĉiam enkondukas parton de distribuita kvanto. La unua demando estas : « *Kion, kiun aŭ kiujn oni distribuas ?* » Ni ripetas : « *Kion, kiun aŭ kiujn oni distribuas ?* »

A.- Ekzemple : *Meti po 2 sukeroj en la tasojn* signifas *Meti 2 sukerojn en ĉiun tason*. Kion oni distribuas ? La sukerojn.

Cl.- Alia ekzemplo : *Tie loĝas po 50 homoj sur kvadrata kilometro* signifas *Tie sur ĉiu kvadrata kilometro loĝas 50 homoj*. Kiuj estas distribuitaj ? La homoj.

A.- Jen ekzemplo de erara frazo : *Meti du sukerojn po taso*. La sukerojn oni distribuas, ne la tasojn.

Cl.- Jen alia ekzemplo de erara frazo : *Tie loĝas 50 homoj po kvadrata kilometro*. La homoj estas distribuitaj, ne la kvadrataj kilometroj.

A.- Tiu lasta frazo *Tie loĝas 50 homoj po kvadrata kilometro* ne estas erara en si mem, sed ĝi signifas, ke ĉiu el la 50 homoj loĝas tute sola sur unu kvadrata kilometro. Oni ja intencis esprimi la malon.

Cl.- Ni alvenas al la demando : *Kiam uzi po ?*

A.- Uzu ĝin nur kiam nepre necesas.

Cl.- Ekzemple, se vi diras : *Li donis po 2 ovoj. Ŝi ricevis po 2 ovoj*. En tiuj du frazoj **po** superfluas, aŭ mankas en ili elemento de plureco.

A.- Korektaj frazoj estas *Li donis 2 ovojn* aŭ kun elemento de plureco : *Li donis po 2 ovoj al la infanoj*.

Cl.- Aliaj korektaj frazoj estas : *Ŝi ricevis 2 ovojn* aŭ kun elemento de plureco : *Ŝi ricevis de ili po 2 ovoj*. Tiu lasta frazo signifas *Ĉiu el ili donis al ŝi 2 ovojn*.

A.- Nova demando : *Kiel uzi po ?*

Cl.- Metu ĝin antaŭ la numeralo, kiu determinas la distribuitan parton.

A.- Ekzemplo : *Ni trinkis po 2 tasoj da teo* signifas *Ĉiu el ni trinkis du tasojn da teo*.

La prepozicio PO
Claude Gacond, 415-a radioprelego, 1971.09.22 & 25

Cl.- Alia ekzemplo : *Ili heredis po 1 kvadrata kilometro da grundo* signifas *Ĉiu el ili heredis 1 kvadratan kilometron da grundo*.

A.- La distribuo povas okazi **inverse**, tiel ke ĉiu egale kontribuas al tuto. Ekzemplo : *Ili kotizis po 5 frankoj* signifas *Ĉiu el ili kotizis 5 frankojn*.

Cl.- Alia ekzemplo : *Ni donacis po 6 ovoj* signifas *Ĉiu el ni donacis 6 ovojn* dum *Ni donacis 6 ovojn* signifas *Kune ni donacis nur 6 ovojn*.

A.- Oni povas klarigi la uzon de la prepozicio **po** per la kontrol-metodo. Se ĉiu taso ricevas 2 sukerojn, tiam diru : *Po 2 sukeroj ne po taso* !

Cl.- Se ĉiu kvadrata kilometro ricevas 50 homojn, tiam diru : *po homoj ne po kvadrata kilometro*.

A.- Se ĉiu gasto trinkis 2 tasojn, tiam diru : *po 2 tasoj ne po gasto*.

C. Se ĉiu filo heredis 1 kvadratan kilometron, tiam diru : *po kvadrata kilometro ne po filo*.

A.- Por fini jen kelkaj frazoj : 1-a frazo : *Enverŝu 10 gutojn po glaso* !

Cl.- Tiu frazo estas erara, ĉar gutojn oni distribuas, ne glasojn. La bona frazo estas : *Enverŝu po 10 gutoj en la glasojn*.

A.- 2-a frazo : *Lui ĉambron po 200 frankoj monate*.

Cl.- Tiu frazo estas korekta, ĉar ĉiumonate oni pagas 200 frankojn.

A.- 3-a frazo : *Vendu la kukojn po 2 frankoj*.

Cl.- Tiu frazo estas korekta, ĉar por ĉiu kuko oni ricevas 2 frankojn.

A.- 4-a frazo : *Li veturas 50 mejlojn po horo*.

Cl.- Tiu frazo estas erara, ĉar mejlojn oni distribuas laŭ la horoj, kaj ne horojn laŭ la mejloj. La korekta frazo estas : *Li veturas po 50 mejloj hore*.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-